

GAZETO ESPERANTISTA ELIRANTA ĈIUMONATE EN BELGUJO.



LA BELGA SONORILO

JOURNAL ESPÉRANTISTE BELGE
 MENSUEL.

BELGISCH ESPERANTISCH
 MAANDSCHRIFT.

PRIX DE L'ABONNEMENT ANNUEL :

2.50 fr. pour la Belgique ;
 3.00 fr. pour l'étranger.
 5.00 fr. (minimum) : abonnement de
 protecteur.

KOSTO DE LA JARA ABONO :

2.50 fr. en Belgujo ;
 3.00 fr. en eksterbelgaj landoj.
 5.00 fr. (almenaŭ) : protektanta
 abonanto.

JAARLIJSCHES INSCRIVINGSPRIJS :

2.50 fr. voor België ;
 3.00 fr. voor den vreemde.
 5.00 fr. (ten minste) : inschrijving
 als beschermer.

Un numéro : 0.25 fr.

Unu numero : 0.25 fr.

Het nummer : 0.25 fr.

Ĉefredaktoro — Rédacteur en chef — Hoofdopsteller : Jos. JAMIN, 55, rue des Drapiers, Bruxelles.

Cenzuristoj — Censeurs — Keurders : E. et L. BLANJEAN, 14, rue de Wautier, Laeken.

Abonoj — Abonnements — Inschrijvingen : M. SEYNAEVE, 3, rue de l'Avenir, Courtrai.

Presisto — Imprimeur — Drukker : A.-J. WITTERYCK-DELPLACE, 4, Nouvelle Promenade, Bruges.

La personoj, kiuj sendos al ni almenaŭ sumon da kvin frankoj, estos enskribitaj kiel protektantaj abonantoj kaj ilia nomo estos presita en ia proksima numeró.

Nia ĵurnala jaro komenciĝas la 15^{an} de Septembro. Se oni abonas post tiu-ĉi dato, oni ricevas la jam elirintajn numerojn.

Les personnes qui nous enverront au moins la somme de cinq francs seront inscrites comme abonnés protecteurs et leur nom paraîtra dans un prochain numéro.

L'année de notre Journal commence le 15 Septembre. Si l'on s'abonne après cette date, on reçoit les numéros déjà parus.

De personen die ons ten minste de som van vijf franken toezenden zullen opgeteekend worden als inschrijvers-beschermers en hun naam zal in een aanstaande nummer gedrukt worden.

De jaargang van ons Blad begint met 15^o September. Indien men zich na dien datum laat inschrijven, ontvangt men de reeds verschenen nummers.

ENHAVO.

- 1^o Penso de l' Norvega esploristo, Fritjof Nansen, dum sia fama ŝipveturado al la Norda Poluso.
- 2^o Atendita libro.
- 3^o La paroladoj de S^{ro} Prof. Lambert.
- 4^o Tra la Mondo Esperantista.
- 5^o Kroniko Belga.
- 6^o Eĥoj.
- 7^o Deziras korespondadi.
- 8^o Ĥinaj anekdotoj.
- 9^o Avizoj diversaj.

SOMMAIRE.

- 1^o Un livre attendu.
- 2^o Les conférences de M^r le Professeur Lambert.
- 3^o A travers le monde Espérantiste.
- 4^o Chronique Belge.
- 5^o Avis divers.

INHOUD.

- 1^o Een verwacht boek.
- 2^o De Voordrachten van den Heer leeraar Lambert.
- 3^o Dwars door de Esperantische wereld.
- 4^o Belgische Kroniek.
- 5^o Verscheidene berichten.

A.-J. WITTERYCK-DELPLACE,

IMPRIMEUR-ÉDITEUR

BRUGES, NOUVELLE PROMENADE, 4.

DRUKKER-UITGEVER

BRUGGE, NIEUWE WANDELING, 4.

JOURNAUX ESPÉRANTISTES — ESPERANTISCHE BLADEN.

- Lingvo Internacia, fr. 4.00 par an (4.00 fr. 's jaars). M^r PAUL DE LENGYEL à Szekszárd, Hongrie.
- L'Espérantiste, fr. 4.00 par an comprenant l'inscription comme membre de la S. F. p. E. (4.00 fr. 's jaars *recht gevende tot de inschrijving als lid van de S. F. p. E.*). M^r EDOUARD BRÉON, Secrétaire de la S. F. p. E. 6, rue du Levant, à Vincennes, près Paris.
- Societo por Internaciaj Rilatoj (S. I. R.), fr. 3.00 par an (3.00 fr. 's jaars); avec l'organe de la Société (*met het orgaan der Maatschappij*) « Lingvo Internacia » fr. 6.00 par an (6.00 fr. 's jaars) M^r PAUL FRUICHTIER, 27, boulevard Arago, Paris.
- Literatura Biblioteko de Lingvo Internacia, fr. 2.50 par an (2.50 fr. 's jaars) M^r PAUL DE LENGYEL à Szekszárd, Hongrie.
- La Lumo, fr. 3.00 par an (3.00 fr. 's jaars) M^r A. REMBERT, 79 rue St-Christophe, Montréal, Canada.
- Rondiranto, fr. 4.00 par an (4.00 fr. 's jaars) M^r G. P. OREŠKOV, Plovdiv, Bulgarie & L. COHEN, 61 rue des Rémouleurs, Gand.
- La Holanda Pioniro, fr. 3.00 par an (3.00 fr. 's jaars) M^r DREVES UITTERDIJK, Hilversum, Holland.
- Bohema Esperantisto, fr. 3.50 par an (3.50 fr. 's jaars) M^r ČEJKA, Th. Bystrice-Hostyn, Moravie-Autriche.
- L'Espérantista, fr. 4.00 par an (4.00 fr. 's jaars) Grafo ALBERT GALLOIS, Riolunato, prov. de Modena, Italie.
- La Svisa Espero, fr. 2.50 par an (2.50 fr. 's jaars) M^r TH. RENARD, 6, rue du Vieux Collège, Genève, Suisse.
- Monata Revuo Esperantista, 2 cour. scand. = fr. 3.00 par an (3.00 fr. 's jaars) M^r E. HÅKANSSON à Södertelge Suède.
- Antaŭen Esperantistoj! 0,150 Livroj = fr. 3.00 par an (3.00 fr. 's jaars) M^r ANT. ALVARADO, str. Lartiga n^o 106^a Lima, Pérou.
- Ĉilio Esperantista, gratuit au Chili (*hosteloos in Chili*) M^r LUIS E. SEPULVEDA CUADRA, cas. 1989, Santiago, Chili.
- La Suno Hispana, fr. 3.00 par an (3.00 fr. 's jaars) M^r AGG. JIMENEZ LOIRA 5, Corona, Valencia, Espagne.
- The Esperantist, fr. 4.00 par an (4.00 fr. 's jaars), M^r H. BOLINGBROKE MUDIE, 41, Outer Temple, W. C. London, England & M. SEYNAEVE, 3, rue de l'Avenir, Courtrai.
- La Juna Esperantisto, 2.50 fr. par an (2.50 fr. 's jaars). M^r H. HOLDER, 9 avenue des Vollandes, Genève, Suisse.
- Internacia Scienca Revuo, fr. 7.00 par an (7.00 fr. 's jaars), M^r PAUL FRUICHTIER, 27, B^d Arago, Paris.

Esperantistaj grupoj en Belgujo.

- Poliglota Klubo en Bruselo, Esperantista Sekcio. Sidejo: Hôtel Ravenstein, rue Ravenstein, 11. Prezidanto: S^r Jos. Jamin, Sekretario S^r L. Blanjean.
- Antverpena grupo Esperantista. A. G. E. Sidejo: Taverne Royale, Place Verte, 39. Viceprezidanto: S^r A. van Langemeersch; Sekretarioj, S^roj Ray. van Melckebeke kaj L. Jamin. Kunvenoj: Ĉiusabate je la 8^h horo.
- Esperantista Katolik-Universitata Grupo E. K. G. Sidejo: Loveno. Sekretario: P. Mattelaer, 3, place de l'Université, Louvain.
- Esperantista Lovena Grupo. Sidejo: Taverne St Jean.

- Café Monico, rue de Diest. (Louvain, Leuven). Prezidanto S^ro Edm. Vandieren. Sekretario S^ro R. Dekeyser.
- Virina Sekcio: Sekretariino, Frⁱⁿo Cl. Nythals.
- Esperantista Studenta Grupo. Sidejo. Gento (Gand, Gent). Prezidanto: S^ro M. Seynaeve, sekretario: S^ro Em. Caerman, studento, St Gilles-Waes.
- Bruĝa Esperantista Grupo. Sidejo: Bruĝo (Bruges, Brugge). Prezidanto: S^ro A. J. Witteryck, sekretario: S^ro Lekeu, 49 rue Wallonne.
- Universitato Popola en St Gilles (Bruselo) Esperantista Sekcio. Sidejo: rue du Fort, 80. St Gilles-Bruxelles. Provizora sekretario: S^ro L. Christiaens.
- Esperantista Grupo en Lieĝo. Provizora sekretario: S^ro Oudenne, rue Dossin, 10, Liège.
- Esperantista Grupo en Gilly. Provizora sekretario: S^ro Fr. Roelandt, Gilly-Sart-Allet.

GAZETO ESPERANTISTA ELIRANTA ĈIUMONATE EN BELGUJO.



JOURNAL ESPÉRANTISTE BELGE MENSUEL.	BELGISCH ESPERANTISCH MAANDSCHRIFT.
PRIX DE L'ABONNEMENT ANNUEL : 2.50 fr. pour la Belgique ; 3.00 fr. pour l'étranger. 5.00 fr. (minimum) : abonnement de protecteur.	JAARLIJKSCHE INSCHRIJVINGSPRIJS : 2.50 fr. voor België ; 3.00 fr. voor den vreemde. 5.00 fr. (ten minste) : inschrijving als beschermer.
Un numéro : 0.25 fr.	Het nummer : 0.25 fr.
Ĉefredaktoro — Rédacteur en chef — Hoofdopsteller : Jos. JAMIN, 55, rue des Drapiers, Bruxelles. Cenzuristoj — Censeurs — Keurders : E. et L. BLANJEAN, 14, rue de Wautier, Laeken. Abonoj — Abonnements — Inschrijvingen : M. SEYNAEVE, 3, rue de l'Avenir, Courtrai. Presisto — Imprimeur — Drukker : A.-J. WITTERYCK-DELPLACE, 4, Nouvelle Promenade, Bruges.	

*Penso de l' Norvega esploristo, Fritjof Nansen, dum sia fama
sipveturado al la Norda Poluso.*

24^{an} de Decembro 1896 je 79^o8 larĝo norda.

De l' komenco de nia sendirektado, nenia neĝfalo okazis. Kristnasko alproksimiĝas tamen, kaj ne estas Kristnasko sen dikaj flokoj. Ho ! kiel bela estas tiu nebruanta neĝo, kiu per sia nemakula mantelo malaperigas ĉiujn konturojn akrajn !

Ĉi tiu kampego de natura glacio similas al vivo sen amo : nenio dolĉigas ĝin ! Amo estas neĝo de l' vivo ! Ĝi resanigas la vundojn ricevatajn en la batalado de l' ekzistado kaj pli pura ol la neĝo ĝi brilegas.

Kiel estas vivo sen amo ? Kiel tiu nemezurebla glacikampego, ĝi estas malvarma kaj sulkigata aĵo, eraranta sendirekte pro la malfavoraj ventoj, sen io ajn por dolĉigi la frapojn de l' skuoj kaj por malakrigi la elstarantajn angulojn de ĝiaj disrompitaj pecegoj.

Jes, tiela vivo estas simila al tiu flosanta glacio, nuda kaj plena je malgataĵoj !

Tradukis,
LUCIEN BLANJEAN.

La Gazetaro. — La parolado de S^{ro} profesoro Lambert evidente naskis tre multe da ĵurnalaj artikoloj, raportantaj pri tiuj paroladoj, en la kelkaj urboj kiujn trairis nia simpatia franca samideano. Ni, plie, citu « Le Bien Public » (Gento), « La Métropole » kaj « Handelsblad » (Antverpeno) en kiuj S^{ro} Mattelaer, el Loveno, daŭrigis sian propagandon por Esperanto ĉe la katolikoj; « Le Progrès Catholique » (Namur) kiu enhavis artikolon iom skeptikan; ankoraŭ kelkajn bonegajn artikolojn en « De Limburger » (Tongres) de S^{ro} Niko, en « L'Union » (Dinant) de S^{ro} A. Panier, kaj en « Klim op » (Loveno) de S^{ro} E. Mathys. Ni speciale konigu la propagandon per la gazetaro kiun ĵus komencis kelkaj novaj partianoj el Andenne: S^{ro} D^{ro} Mélin el Andenne enpresigis en « L'Impartial », tiea ĵurnalo, longan kaj bonegan artikolon kaj S^{ro} D^{ro} Godfrind, el Seilles-Andenne, publikigis en la grava kuracista ĵurnalo « Le Scalpel », pri kiu ni jam raportis antaŭ kelke da tempo, tre longan leteron por Esperanto; ni esperas el tio plej bonajn rezultatojn kaj kore dankas la skribinton.

La « Centra Librovendejo » el Antverpeno (15, Rue Leys) ĵus eldonis nomaron de la libroj kiujn ĝi vendas; sur la unua paĝo ni vidis la plenan nomaron de ĉiuj Esperantaj lernolibroj kaj literaturaj verkoj.

En diversaj aliaj lokoj de Belgujo, oni preparas aŭ faras ageman propagandon por Esperanto; ni pri tio raportos kiam ni posedos detalajn sciigojn.

MAURICE SEYNAEVE.

Ĥhoj.

Eltirita el la « Bulletins de l'Académie Royale de Belgique » (Protokolaro de la Reĝa Akademio de Belgujo).

Klaso de Sciencoj

Internacia Unuigo de la Akademioj

Komuniko farita ĉe la Klaso de Sciencoj, la 4^{an} de Julio 1903, de S^{ro} De Tilly, membro de la Akademio.

S^{ro} De Tilly raportas pri la misio kiun li plenumis en Londono de la 3^a ĝis la 6^a de Junio, kiel delegito de la Akademio ĉe la komitato de la Internacia Unuigo....

S^{ro} De Tilly memorigas pri la deveno kaj la celo de la Internacia Unuigo kiu estas fondita por lernado de demandoj havantaj ĝeneralan intereson, kiuj povas ricevi solvon nek de izolataj scienculoj, nek de izolataj Akademioj, kaj kiuj postulas internacian konsenton.

S^{ro} De Tilly finigas sian komunikon per la sekvantaj pripensoj pri la uzo de lingvoj: « Dum la jaroj 1900^a kaj 1901^a, en Parizo, la ĉefa lingvo uzita ĉe la kunvenoj de l'Unuigo estis, nature, la Franca. En Londono, dum 1903, la Angla kaj Germana lingvoj multe superregis. Kvankam tiuj idiomoj ne estas por mi tute fremdaj, mi sentis gravan malfacilecon por sekvi la disputojn kaj mi konstatis ke mi ne estas

La Presse. — Les conférences de M. le professeur Lambert ont évidemment donné lieu à un très grand nombre d'articles de presse dans les diverses villes qu'a traversées notre sympathique partisan français. Citons « Le Bien Public » (Gand), « La Métropole » et le « Handelsblad » (Anvers) dans lesquels M. Mattelaer de Louvain continue sa propagande en faveur de l'Esperanto dans le monde catholique, « Le Progrès Catholique » de Namur qui a publié un article quelque peu sceptique; encore quelques excellents articles parus dans « De Limburger » (Tongres) de M. G. Niko, dans « L'Union » (Dinant) de M. A. Panier, et dans « Klim op » (Louvain) de M. E. Mathys. Une mention spéciale est due à la propagande, par voie de la presse, que viennent d'inaugurer quelques nouveaux amis d'Andenne: M. le Dr Mélin, d'Andenne, a fait insérer dans « L'Impartial » un long et très bel article et M. le Dr Godfrind de Seilles-Andenne a publié dans l'important journal médical « Le Scalpel », dont nous avons parlé, il y a quelques temps, une très longue lettre en faveur de l'Esperanto; nous en attendons les plus heureux résultats et en remercions vivement l'auteur.

La « Librairie Centrale » d'Anvers (15, Rue Leys) vient de publier un catalogue des livres qu'elle met en vente: nous y remarquons en première page la liste complète de tous les manuels d'étude et ouvrages littéraires de l'Esperanto.

Sur divers autres points de la Belgique, une propagande active se prépare ou est menée en faveur de notre langue; nous en parlerons quand des détails précis nous seront parvenus.

MAURICE SEYNAEVE.

De Drukers. — De voordrachten van M. den leeraar Lambert heeft natuurlijk plaats gegeven aan een groot getal drukpers-artikels in de verscheidene steden, welke onze sympathische Fransche aanhangers doorloopen heeft. Noemen wij « Le Bien Public » (Gent) « La Métropole » en het « Handelsblad » (Antwerpen) waarin M. Mattelaer van Leuven zijne propaganda ten voordeele van het Esperanto in de katholieke wereld, voortzet. « Le Petit Bleu », « Le Progrès Catholique » van Namen die een nogal twijfelzuchtig artikel gegeven heeft, nog eenige uitmuntende artikelen verschenen in « De Limburger » (Tongeren) van M. G. Niko; in « L'Union » (Dinant) van M. A. Panier; en in « Klim op » (Louvain) van M. E. Mathys. Eene eervolle melding is verschuldigd aan de propaganda, bij drukpersweg, welke eenige nieuwe vrienden van Andenne komen in te voeren: M. den dokter Mélin, van Andenne heeft in « L'Impartial » een lang en zeer schoon artikel doen opnemen, en M. de dokter Godfrind van Seilles-Andenne, heeft in het belangrijk geneeskundig blad « Le Scalpel », waarvan wij over eenigen tijd gesproken hebben, een zeer langen brief ten voordeele van het Esperanto uitgegeven; wij verwachten er de gelukkigste uitslagen van en bedanken er over vuriglijk den opsteller.

De « Librairie Centrale » van Antwerpen (15, Leysstraat) komt eene katalog uit te geven van de boeken welke zij te koop stelt; wij bemerken er op de eerste bladzijde de volledige lijst van al de studieboeken en letterkundige gewrochten van het Esperanto.

Op verscheidene andere punten van België wordt eene werkdige propaganda bereid of gevoerd ten voordeele van onze taal; wij zullen erover spreken wanneer nauwkeurige inlichtingen ons zullen toegekomen zijn.

Vertaald door A.-J. WITTERYCK.

sola en tiu okazo. La malfacileco grandigos kiam la Franca, Angla kaj Germana lingvoj ne estos plu akceptitaj, laŭ komuna konsento, kiel la solaj lingvoj uzotaj. Estas do dezirebla ke la scienculoj okupiĝas pri enkonduko de helpanta internacia lingvo, arte, logike kaj simple konstruita, ne havante neregulaĵojn, esceptaĵojn, dubajn kazojn (egalsencajn vortojn, samnomojn k. t. p.) aŭ malfacilaĵojn de ia speco, precipe pri la konjugacio de la verboj kaj, kontraŭe, tiu interkomunikilo havos unuforman kaj facilan elparoladon por ĉiuj nacioj.

Artefaritaj lingvoj jam ekzistas; ili plenumas la kondiĉojn pli aŭ malpli taŭge, sed mi ne deziras, nune, proponi unu el ili prefere ol aliaj. Estas sendube tro malfrue por akcepti tiun projekton antaŭ la kunveno de la 1904^a jaro; sed se oni volus serioze tion, estus facile enkonduki uzon de internacia idioma ĉe la ĝenerala kunveno de 1907, kaj eĉ ĉe la prepara kunveno de la komitato dum 1906. » (Protokolo n^o 8, jaro 1903^a).

Ni esperas ke la deklaro de la simpatia leŭtenanta-ĉefgeneralo De Tilly estas profetaĵo kaj ke la scienculoj de ĉiuj nacioj akceptos liajn proponon kaj opinion — uzinternacian lingvon.

* *

Posta flanko de fama proceso.

La proceso Kwilecki ĉiam estos fama en la juĝa historio de Germanujo. Oni diras prave ke la tuta mondo sekvis, kun intereso, la kortuŝantajn disputojn de tiu eksterordinara proceso. La gravaj demandoj pri kiuj oni disputis, enmiksigis kun lingva demando. Prave oni ankoraŭ rimarkigis ke la juĝaj disputoj estus daŭrintaj nur unu anstataŭ tri semajnojn se la atestantoj kaj la kulpiganto lingve estus komprenintaj unu la aliajn. Efektive, oni devis voki helpon de tradukistoj ĉar la ducento da cititaj atestantoj komprenas nenian vorton de la Germana lingvo: ĉiuj estas Poloj.

La kulpigitoj estis grafino Wesierska-Kwilecka, naskita Bninska de Wroblewo, akuŝistino Ossowska, ĉambristinoj Knoska-Gornecka kaj Bronislawa. Estis ankoraŭ kunkulpigitoj, akuŝistinoj Młodzokoniczka, Chrowsklinska, Pribiszlawokorinska kaj Szymoniczalewska, kuracistoj Klonowiczalski kaj Slupicanowski, k. t. p.

La prezidanto de la juĝa kortego estis kvazaŭ frenezigita pro la neordinaraj nomoj de la atestantoj cititaj de la kulpiganto kaj de la defendantaro.

Jam li diris: « La atestanto Bresweski foriĝu; voku la atestanton Mdeccclxi. » Tiam la jura tradukisto sin intermetis kaj diris: « Mi rimarkigos al Sinjoro Prezidanto ke Mdeccclxi ne estas atestanto, tio montras, per Romaj ciferoj, la daton de la konstruo de la kastelo Kwilecki de Wroblewo, 1861. » !!!

Tiu fama proceso estas finita; ĉiuj kulpigitoj estas senkulpigitaj.

Tradukis Jos. JAMIN.

* *

Neforgesebla tago. Kiam, lastan Vendredon, mi revenis de la lernejo, mi renkontis en la Stacistrato S^{ron} Ch. Lambert, profesoron en Dijono, S^{on} Seynaeve, redaktoron de « La Belga Sonorilo » mian amikon Van Dieren, prezidanton de l'Esperanta Lovena Grupo, kune kun S^{roj} P. Mattelaer kaj de Pierpont, estroj de la Esperantista Katolik-Universitata grupo. La renkonto plenigis je vera plezuro la korojn de ĉiuj. Ĉar estas vera feliĉo fratiĝi kun personoj kiuj kunlaboradas por la sukceso de l' sama afero, kiuj fidis je l' venko de l' sama homaramanta ideo kaj deziras atingi la saman idealon, malgraŭ la diverseco de siaj nacieco, gepatra lingvo, politikaj opinioj kaj sociala stato. Simila signo, l'esperanta steleto, brilis sur ĉiuj brustoj, kiel atestaĵo de la sameco de l' espero, kiuj plenigis ĉiujn korojn. De la unuaj momentoj, la plej amika interparolado, kiel oni facile divenos, traktis nur pri nia kara internacia lingvo. Antaŭe mi ofte interkorespondis kun S^{ro} Seynaeve, nia sindonema samideano el Kortrako, sed ĝis tiam, mi neniam havis okazon interparoladi esperante kun iu ajn. Mi ne kaŝas ke, en la komenco, mi timis parolante erari, ĉar mi de malmulte da tempo eklernis Esperanton. Sed, je mia propra miro, kelkaj minutoj sufiĉis por malligi mian langon kaj ebligi al mi interparoli esperante tre facile pri diversaj aferoj dum nia promenado en la Stratoj de l' urbo kaj dum la vizitado de la riĉaj kolektoj de l' universitata biblioteko. Tiuj bravaj kunfratoj en la paca batalado por Esperanto, en la ĝojo kiun ilia kunĉeesto donis al ili, ne forgesis la ĉefojn de tiu internacia militaro kaj, de la Esperantista sidejo, ili sendis per poŝtkartoj, siajn plej korajn salutojn. Post la verspermanĝo, okazis la tre bone sukcesa parolado de S^{ro} Lambert en la Studenta kunvendo. Kiam la parolado estis farita, vino por kunfratiĝo estis oferata al ĉiuj tieestantaj estroj de la esperanta agado kaj ili kune pasigis ankoraŭ kelkajn tre agrablajn horojn en la plej kora amikeco.

Eŭg. MATHYS, filo, Loveno.

Deziras Korespondadi.

31. Jos. Petit, 142. Boulevard d'Avroy, Liège (Belgujo) pri kiu aĵu objekto, krom komerco, per leteroj aŭ ilustritaj poŝtkartoj.

32. Mathieu Croisier, 23 rue des Franchimontois, Liège (Belgujo) precipe pri muzikaj verkoj, per leteroj aŭ ilustritaj poŝtkartoj.

^ Kinaj anekdotoj.

Iu estis tre avida por la mono. Ia persono diris al li: « Permesu al mi bati vin ĝis morto, mi fordonos al vi milon da ŝafanoj ». Tiu post longa pripensado diris: « Batu min ĝis duonmorto kaj donu kvin cent ŝafanojn ».

**

Gasto, alveninte de malproksime, longe sidis, sed la mastro, kvankam la tuta domo estas plenigata de kokinoj kaj anasinoj, ne volis restigi lin tagmanĝi, dirante ke li havas nenion. La gasto montris tranĉilon kaj petis ke oni mortigu tiun ĉevalon, sur kiu li alvenis, por ke oni kuiru manĝaĵon; la mastro diris: « Per kio do vi reiros? » — « Mi pruntos de vi unu kokinon aŭ anasinojn el la milo, kiun vi havas, kaj sur ĝi, mi foriros ».

**

Tigro kaptis homon; la filo ekpersekutis ĝin kun pafarko, sed kiam li volis pafi, la patro ekkriis de malproksime: « Pafu en la piedojn, gardu ke vi difektu la felon, alie ja neniu donos por ĝi monon. »

K. BOGUSEVIĆ, Stavropol-Kavkazskij, Rusujo.

Avizoj diversaj.

Oni petas nin sciigi ke oni povas aboni la ĵus naskitan angla-esperantan ĵurnalon: « The Esperantist » ĉe S^{ro} Seynaeve rue de l'Avenir, 3, Courtrai. — Jarabono: 4 fr. Oni ankaŭ povas mendi ĉe li pruvan numeron de tiu belega revuo po 0,40 centimoj.

**

La « Esperantista Studenta Grupo » (Universitato de Gento) tre alvokas la belgajn kaj fremdajn samideanojn, societojn kaj Esperantajn ĵurnalojn por ke ili bonvolu helpi la starigon de ĝia biblioteko, Tiu grupo, bedaŭrinde tre malriĉa, tre dankeme ricevos ĉiajn donacajn verkojn aŭ ĵurnalojn: ĉion oni volu sendi al S^{ro} M. Seynaeve (3, Rue de l'Avenir, Courtrai).

Avis divers.

On nous prie d'annoncer qu'on peut s'abonner au nouveau journal anglais-esperanto: « The Esperantist », chez M. Seynaeve, rue de l'Avenir, 3, Courtrai, au prix de 4 frs. On peut aussi se procurer chez lui, au prix de 0,40 centimes, un numéro spécimen de cette magnifique revue.

**

L'« Esperantista Studenta Grupo » (Université de Gand) adresse un chaleureux appel aux partisans belges et étrangers ainsi qu'aux sociétés et journaux Espérantistes, et les invite à coopérer à l'établissement de sa bibliothèque. Ce groupe, qui dispose malheureusement de très peu de ressources, recevra avec reconnaissance tout envoi gracieux de brochures ou de journaux. On est prié de tout adresser à M^r M. Seynaeve (3, rue de l'Avenir, Courtrai).

Verscheidene berichten.

Men verzoekt ons aan te kondigen dat men op het nieuw Engelsch-Esperantisch blad: « The Esperantist » kan inschrijven bij M. Seynaeve, Toekomststr. 3, Kortrijk, aan den prijs van 4 frank. Men kan ook bij hem, aan den prijs van 0,40 centiemen, een proefnummer van dat prachtig blad bekomen.

**

De « Esperantista Studenta Grupo » (Hoogeschool van Gent) richt een warmen oproep tot de Belgische en vreemde partijgenooten, evenals tot de maatschappijen en Esperantische bladen, en noodigt hen uit mede te werken tot het vormen harer boekenverzameling. Deze groep, die ongelukkiglijk over weinig geldmiddels beschikt, zal met dankbaarheid elke kosteloze zende van boekwerken en tijdschriften ontvangen. Men wordt verzocht alles te zenden aan M^r M. Seynaeve, (3, Toekomststraat, Kortrijk).

L'ESPERANTO

Solution du problème de la Langue Internationale auxiliaire.

PROPAGANDA BROŝURO ELDONITA DE LA BELGA SONORILO.

Ni varmege rekomendas tiun broŝuron.
Volu mendi ĝin ĉe S^{ro} L. VANDERSLEYEN, 31, rue des Patriotes, Bruxelles.

PREZOJ.

Unu ekzemplero	0.15 fr. Afrankite.
10 ekzempleroj	1.00 » »
20 »	1.50 » »
50 »	3.00 » »
100 »	5.00 » »

Flandra broŝuro « Het Esperanto » kostas samajn prezojn.

Ĉia mendo estos plenumita tuj post ricevo da mono.

Oni akceptas la Belgajn kaj Francajn poŝtmarkoj por negravaj petoj.

Principaux Manuels en langue française.

en vente aux dépôts de la Maison HACHETTE & C^{ie} et chez SPINEUX & C^{ie} à Bruxelles.

Grammaire et exercices de la langue Internationale Esperanto par L. DE BEAUFONT. — Prix 1.50 fr. (port en plus.)

L'Esperanto en 10 leçons par TH. CART et M. PAGNIER. — Prix 0.75 (port en plus.)

Dictionnaire Esperanto-Français par L. DE BEAUFONT. — Prix 1,50 (port en plus)

Vocabulaire Français-Esperanto par TH. CART, M. MERCKENS et P. BERTHELOT. Prix 2.50 (port en plus.)

Thèmes d'application par L. DE BEAUFONT. — Prix 2.00 (port en plus),

Nederlandsche Handboeken.

Bij den schrijver te Hilversum (Holland) — **Volledig Leerboek der opkomende wereldtaal Esperanto**, door DREVES UITTERDIJK, Trompschool, Hilversum. — Prijs: fl: 1.50 (3.75 fr.) verzendingskosten daarboven.

Bij den drukker van *La Belga Sonorilo*, Nieuwe Wandeling, 4, Brugge: **Het Esperanto in tien lessen**, aan fr. 0,50.

La « BELGA SONORILO » acceptera des annonces qui devront satisfaire aux conditions suivantes:

- 1^o Etre rédigées exclusivement en Esperanto;
- 2^o Emaner de personnes s'engageant à correspondre en Esperanto,
- 3^o Les annonces doivent être prises pour une année entière.

1/16 e page annuellement fr. 8.00
1/8 » » » » 15.00

De «BELGA SONORILO» aanveerd aankondigen die aan de volgende voorwaarden moeten voldoen.

- 1^o Opgesteld zijn uitsluitelijk in Esperanto;
- 2^o Gegeven zijn door personen die zich verplichten in Esperanto te schrijven;
- 3^o De aankondigingen moeten genomen worden voor een gansch jaar.

1/16 bladz. jaarlijks fr. 8.00
1/8 » » » » 15.00

La unua filokarta ĵurnalo publikigita en Francujo

La Carte Postale Illustrée

LA ILUSTRITA POŝTA KARTO.

GRANDA ORA MEDALO DE LA UNIVERSA
EKSPOZICIO DE POŝTAJ KARTOJ, PARIZO 1900

UNU NUMERO: 30 CENTIMOJ.

Kosta de la abono: FRANCUJO: 3.00 fr. jare.
ALILANDO: 4.00 fr. jare.

Senpagan pruvan numeron oni sendas post peto per ilustrita poŝta karto.

La abonantoj havas la rajton postuli tri liniojn enpresitajn en ĉia numero.

7, rue Pierre-le-Grand, PARIS (VIII^{ème})

LE PHILOCARTISTE

LA FILOKARTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA « CARTOPHILE-CLUB »
JARA ABONO POR ĈIUIJ LANDOJ: 3 FRANKOJ.

La Filokartisto estas organo de la kolektantoj de ilustritaj poŝtaj kartoj.

8, rue de la Pépinière, PARIS (VII^{ème})

Le Cartophile Illustré

MONATA BULTENO DE LA ILUSTRITA POŝTKARTO
ABONPAGOJ: Franclando. 3,50 frankoj jare -- Alilandoj. 4,00 frankoj jare.

« Le Cartophile illustré » enhavas de 16 ĝis 32 paĝojn; ĝi estas la plej dokumenta kaj la plej bone informita el la tiaj ĵurnaloj. Oni sendos pruvan numeron al tiuj legantoj niaj, kiuj petos ĝin rekte al la Administracio.

7, Rue de Lille, PARIS.

LA REVUE POLYGLOTTE

REVUO POLIGLOTA POR LERNO KAJ PROPAGANDO DE LA FREMDAJ LINGVOJ

Eliras en la lingvoj franca, angla kaj germana la 5^{an} kaj la 20^{an} de ĉiu monato. — Kosto: jare 5 frankoj.

Sin turni al la Direktoro S^{ro} F. HERMANN
25, rue des Charbonniers, BRUXELLES (Nord).

Federacio de la Belgaj Filatelistoj.

Oni Korespondas Esperante.
Pri sciigoj oni sin turnu al la Esperantista Sekretario, S^{ro} J. Coox, Kontisto, en Duffel (Belglando). Aldonu poŝtmarkon por la respondo.

S^{ro} Pierre Nicot de Villemain

8, Avenue Masséna, NICE.

Deziras korespondadi Esperante pri la insignoj kaj la heraldika arto en ĉiuj landoj.

Interŝanĝas ankaŭ poŝtkartojn ilustritajn sed nur pri la militistaro kaj la milita maristaro de ĉiuj landoj.

The Cosmopolitan Correspondence Club

— INTERNACIA ORGANISMO —

Organo: « THE GLOBE TROTTER ».

Alvokas membrojn el ĉiuj landoj. — Pri pli detalaj informoj sin turni rekte al « The Secretary of the C. C. C. » Milwaukee, Wisconsin, U. S. A.

Praktika Revuo de Komerciaj Sciencoj.

Redaktita en Franca lingvo sub la direkto de Sinjoro O. Orban, profesoro de la Universitato de Lieĝo. — Eliras ĉiumonate dum naŭ monatoj, de la 15^a de Oktobro ĝis la 1^a de Aŭgusto.

Unu numero : 1.00 franko.
JARA ABONO : Belgujo : 5.00 frankoj.
 Alilando : 7.50 frankoj.

Sin turni al la Direktoro, 26, rue Basse Wez,
 LIÈGE (LIÈGE).

SPINEUX & C^{IE}

— FREMDA LIBREJO —

FONDITA EN 1833

62, Montagne de la Cour
BRUSELO.

Telefono 3688 ☉ ☉ Telefono 3688

Libroj eldonitaj de HACHETTE & C^{IE}

Vendas ĉiujn esperantistajn librojn kaj, ĝenerale,
 ĉiujn librojn verkitajn en ia lingvo.

KORESPONDANTOJ EN ĈIUJ ALIAJ LANDOJ.

ONI KORESPONDAS ESPERANTE.

LA PERILO DE LA GAZETISTARO.

(L'INTERMÉDIAIRE DE LA PRESSE).

15, rue S^{te} Gudule, BRUXELLES.

Legas, tradukas, detranĉas ĉiujn ĵurnalojn, gazetojn kaj revuojn de la tuta mondo kaj sendas, el ili, ekstraktojn pri ĉiuj objektoj.

Ĉiu kiu deziras interesadiĝi je ia demando, abonas « L'Intermédiaire de la Presse. »

Prezarojn pri abonoj oni sendas laŭ demando.


Oni korespondas en Esperanto.

* KOMERCEJO *

JULES BONTE

RUE DES BOUCHERS, 55

BRUGES.



Tuta aranĝigo de presejoj. — Fabrikado de maŝinoj por presi. — Ĉiuj iaj specoj da literoj kaj duailoj. — Broĉiloj per nikelfadeno, altranĉiloj, premiloj por atlasigi, numerigiloj, inkoj, kliŝajoj, k. t. p.

Post peto, oni sendas, senpage, modelojn kaj prezarojn.

KELKAJ FLOROJ ESPERANTAJ.

Ĝlustrita Ĝegolibro

DE A.-J. WITTERYCK.

Prezoj por unu numero	{	En Belgujo : franko : 0,20
	{	En eksterbelgaj landoj : fr. 0,25
Prezoj por kvin numeroj	{	En Belgujo : franko : 0,75
	{	En eksterbelgaj landoj : fr. 1,00.

Sin turni al A.-J. WITTERYCK, BRUGO.

« La Belga Sonorilo »

UNUA JARKOLEKTO.

PREZO : Belgujo : 2,50 frankoj.
 Alilando : 3,00 frankoj.

Sin turni al S^{ro} M. SEYNAEVE, 3, rue de l'Avenir,
 COURTRAI.

ESPERANTA KOLEKTO DE L. I.

Verkoj zorge elektitaj kaj en plej regula Esperanta stilo.

N-ro 1. Kurioza Sunhorloĝo, de S. Poljanskij, kun 4 figuroj kaj 2 kalkul-tabeloj Of 50 centim.

N-ro 2 Esperanta Frazlibro de l' Turisto, 400 utilaj frazoj en Esperanto kun tradukoj angla, franca, germana, hispana, itala, adresaro de la diverslandaj grupoj kaj societoj Esperantistaj, prezaro de lernolibroj, propagandiloj, k. t. p. Of 50 centim.
 Por membroj de S. I. R. Of 35 centim.

N-ro 3. Esperanta Sintakso laŭ verkoj de S-ro Doktoro ZAMENHOF kaj aliaj, en Esperanto, de P. Fruictier, ĉefredaktoro de « Lingvo Internacia » 1,50 fr.

Poŝtmarkoj estas akceptataj nur por $\frac{3}{4}$ de ilia valoro.
 PARIS, 27, Boulevard Arago.